# 4-a Internacia Vintra Universitato
## - agnoskita kiel AIS-sesio -

*Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu antaŭe nomiĝis Internacia SOMERA Universitato (ISU), ricevis antaŭ kvar jaroj VINTRAn fratineton. En 2007 unuafoje okazis dum IF en Düsseldorf la Internacia Vintra Universitato (IVU) - la vintra ekvivalento de IKU, kiu samtempe estas studadsesio de AIS (same kiel estas IKU en la lastaj 15 jaroj). IVU-kurso konsistas el unu aŭ du prelegoj. La ĉi-jara elekto de temoj kongruas kun la IF-ĉeftemo "lingvoj": vi povos aŭdi pri la rusa lingvo, sperti pri la hebrea, kaj eĉ pri la Universa, nome, la lingvo de Astronomio, kun praktika parto - teleskopa observado de la ĉielo. Aliaj IVU-prelegoj traktos lingvajn elementojn kiel dialektoj kaj idiomoj, kaj elementojn el la lingvo de geografio (longitudoj). Kiel en antaŭaj jaroj, en kelkaj IVU-kursoj estos ebleco ekzameniĝi kaj akiri AIS-atestojn.* *Amri Wandel (rektoro)*

Prof. d-ro Amri Wandel (Israelo)

### » Universa lingvo: De Genezo ĝis Koperniko «

La prelegoj sekvas la evoluon de la plej antikva scienco: astronomio. Kvankam ĝi temas ĉefe pri astronomio, sed aperas en ĝi ankaŭ humanaj sciencoj, kiel historio, antropologio arkeologio kaj eĉ teologio. Ĝi ne parolas nur pri astroj, sed ankaŭ pri pastroj. Ĝi turnas sin al ĉiuj homaranoj, kiuj kredas ke la sciencoj, kaj aparte astronomio kaj fiziko, estas la idiomo plej universala: la lingvo de la Universo. La dua parto "de Galileo ĝis Hubble" skizos la gigantan evoluon de la Astronomio en la moderna epoko- ekde la malkovro de la teleskopo far Galileo ghis la maklovro de la ekspansio de la universo far Edvin Hubble, kaj la plej imponaj observoj per la spac-teleskopo kiu portas lian nomon. *(2x 90 min.)*

Ugo de Riu (Italio)

### » Longitudo – de Stonehenge ĝis GPS «

La kapablo koni certe sian lokiĝon dum vojaĝoj, precipe en la maroj kaj en la vastaj oceanoj, estis longtempe bezonata de maristoj kaj kartografoj, kaj ĝia manko kaŭzis sennombrajn mistrafojn, ŝip-pereojn, kelkfoje katastrofojn. Ekde jarmiloj la plej brilaj sciencaj mensoj klopodis solvi la problemon de longitudo, sed eĉ dum la grandaj esplorvojaĝoj de la 16-a jarcento taŭga solvo tute ne haveblis. La lastatempa GPS-solvo estas teknologie altnivela, sed - ankoraŭ utilas kompreni la esencon kaj historion de la defio "longitudo". *(1x 90 min.)*

Josef (Josi) Ŝemer (Israelo):

### » La hebrea lingvo (עברית / ivrit) «

La hebrea, kiun eĉ Zamenhof scipovis, estas unu el la plej antikvaj lingvoj de la mondo, kiuj estas uzataj nuntempe. Ĝi estas la lingvo de la juda popolo, la oficiala lingvo de la ŝtato Israelo kaj la origina lingvo de la Biblio (Malnova Testamento). Josi rakontos pri la historio, inkluzive de la 'miraklo' de ĝia reviviĝo post 2000 jaroj, prezentos ĝian unikan alfabeton kaj montros, ke temas pri lingvo de radikoj. Hebreaj vortoj baziĝas sur trikonsonantaj radikoj, rilatajn ideojn eblas formi per aldono aŭ ellaso de prefiksoj ... *(IVU-prelego: 2 x 90 min.)*

# 4-a Internacia Vintra Universitato
## - agnoskita kiel AIS-sesio -

Tatjana Loskutova (Rusio)

### » Lingva diverseco kaj lingva politiko en Rusio «

La popoloj de Rusio parolas en pli ol 100 lingvoj kaj dialektoj, kiuj apartenas al diversaj lingvaj grupoj. En Rusio konserviĝis tutmonda tendenco de centralizitaj ŝtatoj al disvastigo de ŝtata lingvo, sekve la rusa lingvo iĝas fakte la gepatra por ne-rusaj civitanoj, por ĉ. 130 milionoj da loĝantoj de Rusio. La lingvo estas orient-slava kaj apartenas al la plej disvastigitaj lingvoj de la mondo. Ĝi estas unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de UNO. La alfabeto enhavas 33 literojn, kelkaj el ili koin-cidas laŭ skribmaniero kaj/aŭ prononco kun la latinaj, ekz. A, E, O, K, M, T. La pres-formaj variantoj de la literoj ofte diferencas de la skribaj. *(IVU-prel.:1 x 90 min..)*

Daniel Moirand (Francio)

### » Aleksandro Dumas: lia familio kaj 'La Grafo de Monte-Kristo' «



La aŭtoro Aleksandro Dumas, kun pli ol 260 verkoj, aperas kiel unu el la gi-gantoj de la franca literaturo. Liaj du plej konataj libroj La 'Tri Musketeroj' kaj 'La Grafo de Monte-Kristo' estas mondskale konataj kaj tradukitaj. En Eo mankis la traduko de la lasta. Tiu truo estas nun ŝtopita dank' al la bela traduko de Daniel kaj la eldono de FEL (nun havebla en nia libroservo). Sed ekster tiu literatura aktiveco, la historio de Aleksandro Dumas kaj de lia familio, aperas tute ekster-norma, ekde la avo, kiu ekziliĝis en Haition kaj "geedziĝis" tie kun negrino, la patro, kiu fariĝis generalo kaj estis kunulo de Napoleono Bonaparto, kaj Dumas-la patro (kiel diras francoj) kies vivo jam estas romano. Fine, Dumas-la filo, same famiĝis sur la literatura kampo kun 'La Damo kun kamelioj'.La prelego prezentos kelkajn historiajn elementojn pri la kvarŝtupa familio kaj iom detalan enkondukon pri 'La Grafo de Monte-Kristo'. *(IVU-prelego: 1 x 90 min.)*

Daniel Moirand (Francio)

### » Antoine Galland, lia vivo kaj enkonduko en la prologon de 'La Mil kaj Unu Noktoj' «

Malmultaj el ni konas la nomon de Antoine Galland, franca erudiciulo, orientalisto, kiu fine de la 17-a jarcento hazarde malkovris la unuan faskon da arabaj manuskriptoj kun rakontoj ĉerpitaj el la fabelaro de 'La Mil kaj Unu Noktoj'. Ni pritraktos liajn vivon kaj aventurojn en tiu fabela oriento, kiun li tiel majstre scipovis prezenti en siaj tradukoj. Tiuj tradukoj famiĝis tra tuta Eŭropo de la 18-a jarcento. La rakonto pri lia vivo estis sufiĉe interesa, por ke oni dediĉu al ĝi iom da atento dum la prelego. Post la en-konduka parto ni eniros la feinan mondon de la arabaj rakontoj kun la detala prezento de la 'Prologo'. Tiu prologo, kiu enhavas du tipajn arabajn rakontojn, ebligas kompreni la sistemon de tiuj fabeloj. Ĝuu enkondukon en la rakontaron, estu libera pliprofundigi la ŝaton al tiaj rakontoj.
*(IVU-prelego: 1 x 90 min.)*

# 4-a Internacia Vintra Universitato
## - agnoskita kiel AIS-sesio -

Tacuo Huĝimoto (Japanio)

### » Idiolekto, dialekto, idiomo «

Idiolekto estas la individua lingvo de ĉiu homo, ekz. la vorttrezoro, la lingvo-uzo, la stilo kaj la prononco. Dialekto estas la 'koloro' de la lingvo en ekz. regiono aŭ loko, sekve ne havas grandan disvastigon. Idiomo estas la lingvo-uzo de fiksita grupo de homoj, ekz. ĉiu nacia lingvo, sed ankaŭ la lingvo-variantoj de tiu nacia lingvo kun regiona rilato. Tacuo parolas konkrete pri la temo, surbaze de propraj spertoj. En la dua parto li traktos ankaŭ la entreprenon 'eldonejo ludovikito', ĉar li estis la 'fenestro' por ludovikito. *(IVU-prelego:1 x 90 min.)*

Inter 1965 - 2007 Tacuo estis profesia Esperanto-instruisto ĉe Oomoto, apud Kyôto

Kristin Tytgat (Belgio)

### » Ĉu la nederlanda estas monda lingvo? «

Ĉu nederlandlingvanoj pli bone lernu la anglan aŭ eĉ la ĉinan? Tio estis la temo de studotago, organizita okaze de la 30-jara ekzisto de la Nederlanda Lingvo-Unio. Ni pritraktos kelkajn tipajn trajtojn de la nederlanda, kiuj povas interesi ankaŭ ne-nederlandlingvanojn. Ni provos kompari kelkajn aspektojn de tiu lingvo al aliaj, eble viaj lingvoj. Kristin invitas al tiu klariga prezento, kie vi ekscios kuriozaĵojn, kiujn vi eble ankoraŭ ne sciis. *Tot dan!* *(IVU-prelego: 1 x 90 min.)*

*Kristin instruas germanan kaj nederlandan lingvojn en la instituto por tradukistoj kaj interpretistoj de la Libera Brusela Universitato.*